


SUBTRANCIA STELO



Bulteno de la Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono: 30 F

al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon


CCP 956-28 P Montpellier - N° 125 - 2a kvaronjaro 1993 -

VALENCIA 93

78^e CONGRES UNIVERSEL

D'ESPERANTO EN ESPAGNE

DU 24 AU 31 JUILLET



...DÉJÀ 68 NATIONS ANNONCÉES !

La kongreso – borde de parko

Ni ankoraŭ ne menciis la vigan muzikan vivon en Valencio, pro kiu tiu ĉi urbo ĝuas famon en la tuta lando. Unu el la perloj de la moderna urba arkitekturo estas la Muzika Palaco, kiu estos la kongresejo de la 78-a UK. Ĝi ofertas tutan sian kapaciton kaj komforton al la esperantistoj, sed ĝi ankaŭ bonvole ofertas sian idealan situon ĉe la bordo de alia urba kuriozaĵo: la senakva rivero Túria, nun transformita en parkon. La kongresejo proksimas al la ĉefaj hoteloj kaj al la universitataj loĝejoj, kie loĝos multaj kongresanoj.

En Valencio, mediteranea urbo, ankaŭ la kongreso sekvo mediteraneajn kutimojn almenaŭ pri unu afero: siesto tagmezo. Tio donos pli da okazoj por ĝui bonegajn valenciajn manĝojn kaj vinojn, por promeni en la urbo kaj ripozi, sed ankaŭ por pli efikaj kongresi.

La kongreso komenciĝos tre valencieske per giganta paeljo por ĉiuj partoprenantoj. Tio ne estos nur interkona vespero, ĝi estos speco de senpaga bankedo por ĉiuj kaj antaŭ ĉio – spektaklo. Same ĉiu alia kongresa tago portos iom da surprizoj, lokaj koloroj kaj inspira etoso.

POST LA NACIA KONGRESO DE PAU

Kiam la Kultura Centro de Pau-Adour (Francio) akceptis organizi la 85-an kongreson de Esperanto, neniu supozis, ke ĝi estos tiom bele organizita. Kvankam je 1400 km de Bulonjo ĉe Maro, ĝi venigis francojn el la plej diversaj anguloj. Forte mankis eksterlandanoj, ĉefe hispanoj, eĉ se aperis britoj, germanoj, luksemburganoj kaj poloj.

Estonte prioritatas informado (vidu anonceton pri konkurso pri videobendoj) kaj kulturo (festivalo de teatro kaj kanzonoj en Parizo, 11-16.XI.), eldono de matematika vortaro franca-Esperanto, daŭrigo de la eldonado de literaturaj suplementoj.

Ne mankis kulturaj eroj: prelego pri la lingvo-instruopolitiko en Francio fare de Françoise Drouard, inspektorino de la Nacia Edukado, debato gvidata de Roberto Lloancy pri «ĉu la historio de Esperanto devas interesi esperantistojn», ronda tablo pri «Kiaj lingvoj en Eŭropo» - gvidata de Marie-T. Lloancy kaj Michel Zakowski; psikologiaj ekzercoj renkonte al alia homo, fare de Tyburcjusz Tyblewski; eltirajoj el la teatraĵo de Marcel Pagnol 'Topaze', plenumitaj de tuluzanoj.

Distroj ankaŭ abundis: vizito de la urbo, ekskursoj al Lourdes, Vaskio kaj Hispanio; bankedo kaj balo en tipe regiona etoso, agrabia spektaklo de folkloraj dancoj

kun kantoj en la regiona lingvo kaj interesa enkonduko pri la koncernaj kutimoj.

Sendis kuraĝigajn mesaĝojn la nova Ministrino pri Junularo kaj Sporto, la eks-Ministro kaj urbestro akceptis ĉiujn kongresanojn en la urbodomo. Pro la plenspiteco de la programo, la Fermo okazis post la aperitivo, antaŭ la bankedo!

La venonta franca kongreso okazos ĉe la Mediteraneo, en Agde-Sète, apud la lageto de Thau. Eksterlandanoj venu: en francaj kongresoj Esperanto estas parolata!

Renée Triolle

Vous avez bien lu : le prochain congrès national aura lieu chez nous à AGDE, du 12 au 15 Mai 1994 (Ascension). Réservez ces dates!

NE MIRU se tiu numero de SFS iom malfruas. Malgraŭ insisto en Limoux pri la limdato, multaj simple forgesis ĝin! Ĉu kulpas la fakto, ke pro suplementaj folioj lastfoje la dato ne estis evidenta? Ĉu oni ankoraŭ nescias, ke la limdato ĉiam troviĝas sur la lasta paĝo? Ĉu iuj kredas, ke la tajpanto-redaktoro pretas tajpi iam ajn? Ve, la semajno post la limdato estis rezervita por la preparado de la bulteno...

Pro malfrue aŭ ne-alvenintaj raportoj,

- la redaktoro okupis la unuajn tagojn de siaj ferioj por fintajpi ion kaj postdankas,
- kelkaj eventoj en nia regiono... jam okazis kaj vi ne povos partopreni. Bonvolu informi mi trimestron anticipe! Ne fine de Junio por evento komence de Julio (tio ja okazis)!

Venontfoje memoru, ke la limdato estos la 25a de Septembro (dato de ricevo de artikoloj). Nia aŭtuna kunveno okazos (teorie) la 19an de Septembro en Batipaume (Agde), ne en Sète, ne pli frue pro la "Semajno" en Sète kaj pro forumoj de asocioj. Ni kunvenos ekde la 9a30. Ni rapide pritraktos la federaciajn aferojn kaj poste detale la organizadon de la nacia kongreso en Agde (de la 12a ĝis la 15a de Majo 1994 je Ĉielirado). Venu kun viaj ideoj, sugestoj... kaj preteco helpi! Kompreneble la kunveno daŭros la tutan tagon. Ni atendas tiujn, kiuj sin anoncis por partopreni en la LKK (loka kongresa komitato). Ni kalkulas je ili. La sukceso de la kongreso dependos de bona organizado. Nepre notu la datojn de la kongreso! La kutima staĝo okazos ĵus antaŭ la kongreso, do eblos pasigi tutan semajnon en Agde. Informu viajn geamikojn!

NE FORGESU, ke la abontarifo al SFS estas 30F. Kasistoj de la grupoj ne forgesu sendi la monon kun klaraj indikoj pri la nomoj kaj adresoj!

Ĉijare la nombro da malfrue aŭ ne-pagintoj estas pli alta ol kutime. Sparu al ni la penon kontroli denove, skribi realvok-leterojn, ktp.!

NE FORGESU, ke varbado estas la unua paŝo por la progresigo de E°. Plej bonaj cirkonstancoj tiucele estas okaze de la forumoj de la asocioj en Septembro-Oktobro. Informiĝu pri la datoj kaj, se vi bezonas helpon aŭ materialon, kontaktu la federacion!

Dankon pro via atento! Bonan legadon de SFS! Agrablajn feriojn! Ĝis
J.H.

Résumé de ce qui précède:

- N'oubliez pas la date limite (le 25 Septembre) pour vos articles!
 - Le 19 Septembre à Agde, nous préparerons le Congrès National (12-15 Mai 1994) pour lequel toutes les bonnes volontés seront les bienvenues
 - Si vous n'avez pas encore réglé votre abonnement 93 à SFS, il est temps!
 - Profitez des foires aux associations pour présenter l'E°; la fédé peut vous aider
- Bonnes vacances!

RAPORTO PRI LA FEDERACIA KONGRESO EN LIMOUX

Ĝi okazis la 15an kaj 16an de Majo 1993 en Limoux. Ne nur kunvenis la Federacio Langvedoko-Rusiljono sed ankaŭ reprezentantoj de grupoj de Sudo-Pireneoj. Organizis la aranĝon Jorgos cent ĉeestantoj sin movis en la ĉefurbo de la ŝaŭmvino "Blanquette"

Okazis ankaŭ "Sudfrancia Junulara E°-renkontiĝo", franc-okcitan-katalana publika debato pri la temo: "Occitanie, Catalogne; régions linguistiques d'Europe". Debatis Pierre Janton el Clermont-Ferrand, Serge Granier el Narbono kaj Ferriol Macip i Bonnet el Katalunio.

La debato estis vigla: multaj demandoj, multaj respondoj. Teatraĵo, folk-balo kun "Aigarella". Tre, tre bona vespero, zorgeme organizita.

Post la kutimaj bonvenoj, kelkaj ordinaraĵoj. La ĉefa afero, kompreneble, estis la organizado de la Nacia Kongreso 1994. Verŝajne en Agde kun tago en Sète. En Agde estas taŭga salono por la ĉefa parto de la kongreso kaj diversaj loĝebelecoj. La grupo de Béziers, kiu ĉiam bone organizas staĝon je Ĉielirado, proponas organizi ĝin antaŭ la kongreso: staĝo de la 8a ĝis la 11a de Majo, kongreso de la 12a ĝis la 15a de Majo.

Volontuloj sin prezentis por la kongresa komitato. Nia prezidanto Jean Hénin prezentis dum la kongreso de Pau lumbildojn pri Agde kaj Sète.

Ni distribuis la libreton de Pierre Janton al la liceoj de la regiono; ne venis multaj reagoj. Aperis nova BT2j pri E°; ni aĉetos kelkajn ekzemplerojn por la kolegioj.

La mandato de 5 komitatanoj finiĝis: S-ino Andrée Gausson (30 St Mamert), S-ino Lucette Négron (34 Lunel), Ramos Anson (66 Le Soler), S-ro Louis Ensuque (34 Montpellier), André Rocher (12 Espalion). Ĉiuj rekandidatiĝis kaj estis unuanime reelektitaj.

Ni speciale ĝojis revidi nian junan amikon R. Anson. S-ino G. Charpentier prezentis la "Mondcivitanajn".

Denove ni gratulas Jorgos kaj liajn helpantojn pro la bonaj organizado kaj zorgado de la kongreso.

La sekretario: C. Gérard-Voinçon

DEBATO PRI LINGVOJ

Dum la federacia kongreso en Limoux, la ĉeestantoj povis aŭskulti kaj partopreni debaton pri la rilatoj inter la lingvoj. La anoncita titolo de la debato estis : "Okcitanio, Katalunio, lingvistikaj regionoj de Eŭropo". La enhavo riveligis tre riĉa kaj grava samtempe, ĉar refoje ni povis konscii, ke lingvo estas ne nur rimedo por komuniki, sed profunda ligilo, kiun posedas komunumo por esprimi sian sendependon, sian unuecon kaj sian identecon. Fakte, mi komprenis, dank al Sro Llibert Puig el Sabadell, ke ni parolis pri tri lingvoj kaj pri la rilatoj de ĉiu al la aliaj du. La tri estas nepre necesaj al ni.


-Unue, la lingvo de niaj prapatroj; la prelegantoj, Sro Garnier kaj F. Macip i Bonet prezentis la okcitanan kaj la katalunan; ili rimarkigis, ke ĝis antaŭ ne tiom longe, ambaŭ t.n. regionaj lingvoj estis forte malpermesataj kaj kontraŭitaj de la ŝtataj instancoj. Nun, oni konstatas, ke ili pli-malpli malaperis (la gejunuloj ne plu uzas ilin), kaj ke, malsimile al Esperanto, kiu estas juna, kreskanta lingvo, ili estas mortantaj lingvoj. Tial, ili ne plu endanĝerigas la ŝtatan, oficialan lingvon; jen kial la instancoj havas pli malferman sintenon: la cenzuro leviĝis, ĉar ili havas nenion por timi

-nia ŝtata lingvo: ĝi estas oficiala kaj deviga. Ni mem do ne devas zorgi pri ĝi; la ŝtato faras tion. Tamen Sro Janton prave substrekis, ke nova afero estas, ke ĝi ricevas la minacon de la angla lingvo tra la invado de la usona kulturo. Oni kredigas nin, ke la angla lingvo reprezentas enirilon al usona modelo; ĝia invado des pli efikas, ke ĝi estas ne-perforta sed per-alloga. La allogo de komforto, de riĉo, de plezuro, de socia progreso, kaj de libereco. Tiel, ankaŭ niaj naciaj lingvoj estas minacataj de la trudpremo de la angla lingvo.

-la internacia lingvo: por ni, Esperantistoj, estas neniu hezito inter Esperanto kaj la angla. Sed ni batalu en duobla direkto: unue por ke Esperanto estu akceptita de la ŝtataj instancoj, kaj due por ke la angla ne ĉion malaperigu. Ni estu treege singardaj, kaj pluraj partoprenantoj de la debato tre pesimistis; kun Sro Janton ni ĉiuj malkovris, ke la modelo kultura de la okcitanoj, de la katalunoj pli kaj pli troviĝas en la usona direkto, ne en la gepatra.

Konklude, ni Esperantistoj klopodu profiti ĉiun okazon praktiki Esperanton kaj konvinki la homojn pri ĝia utilo. Ni ripetu, ke neniu lingvo pli indas ol alia; kaj ni konsciu, laŭ la konsilo de Sro Garnier, ke malbonas la supereco de unu lingvo super alia(j) kaj ĉiu streĉiteco de la situacio.

Fine, mi amuziĝis resumi la debaton per skemo, kie la sagoj montras la forton de la premo



M.M.

NE-OFCIALA RAPORTO PRI LIMOUX

Antaŭ la kongreso estis ekspozicio por lernejanoj. La kongreso komenciĝis per gustumado de Blanquette; vendiĝis (kaj plu vendiĝas/vidu poste) boteloj kun belega E-lingva etikedo. Vendiĝis (kaj plu vendiĝas) T-ĉemizoj kun 4kolora simbolo (verda stelo kaj flavaj+ruĝaj simboloj). 8 kandidatoj provis la ekzamenojn de Franca Instituto de E° (sub estrado de V. Lutermano). Tuluzaj geesperantistoj prezentis teatraĵeton el "Topaze". 2 junulinoj ludis skeĉon "la telegramisto". La grupo Aigrela ludis triafoje por Esperantio. Esperantistoj el Meznordaj Pireneoj kunvenis por fondi E°-federacion (vidu la protokolon). Finiĝis la kongreso per tipa festomango en la restoracio "Maison de la Blanquette" kaj vizito de keloj de "Blanquette de Sieur d'Arques". Prizorgis la riĉan libro-servon kaj la trinkejon pluraj dankindaj gejunuloj: David, Michel, Anik, Patrick, Monik'.

Boteloj de Blanquette kun E°-etikedo estas mendeblaj al la vithienulo J. Bigou 11260 Rouvenac aŭ al Jorgos (61 60 86 83):

- duondolĉa aŭ nedolĉa kun feĉo:
 - 1 botelo: 37F 6 boteloj: 200F
 - dolĉa, ĥdolĉa, nedolĉa sen feĉo:
 - 1 botelo: 40F/ 6 boteloj: 220F
- T-ĉemizoj (unu T-ĉemizo=150g)
 - 17-ĉemizo: 70F 10: 560F

En ambaŭ kazoj (boteloj kaj Tĉemizoj) aldoniĝas la sendokostoj.



PROKOKOLO DE KUNVENO EN LIMOUX

dimanĉe la 16an de majo 1993
cele al kreo de regiona federacio de esperanto-asocioj

-*-

Ĉeestas: Jorgos, C. Fressonnet (Ariege), B. Legeay, A. Rocher (Rodez), J. Caubel, G. Catala, ge-Lafosse, Cash, Issert, s-ino L. Montere (Toulouse), s-ino Fau (Castelnau, apud Albi), Y. Bashimont (Castelsarrazin), kaj L. Vignaux (JEFO).

- Jorgos, kiu kunvokis la kunvenon, klarigas la situacion kaj prezentas sian proponon:

- Esperanto-Federacio de Languedoc-Russillon (aliĝinta al UFE) arigas 90%ojn de la tieaj esperantistoj - la aliaj 10%oj ne deziras aktivi sub ŝildo de UFE.

- En Aquitaine ne ekzistas Federacio sed Esperanto-Gironde (SAT-Amikaro) estas tre forta. Ili sukcesis disvolvi ĝemeliĝan agadon kun Vaskio, kio estas favorata de la nunaj aŭtoritatoj.

- En nia regiono Midi-Pyrénées ekzistas disaj fortoj: ekzistas grupoj en ĉiuj urboj de kie venas la partoprenantoj sed ankaŭ en departemento Lot, (ia Krizalido, Gramat), en Albi, en Montauban, ktp....

- Ekzistas ankaŭ la dulingva informilo *Esperanto-Pyrénées*, kiun s-ro Pons metis je dispono de la arieĝaj esperantistoj (jara kosto por 4 numeroj estas po 25 frankoj).

La propono starigi FEDERACION celas:

- Arigi esperantistojn el la tuta regiono sen sekteco (UFE-aktivuloj samkiel SAT-aktivuloj, aŭ aliaj).
- Kunligi ties diversajn projektojn (dudeko, laŭ la listo antaŭe sendita de Jorgos), cele al komuna subvencipeto al Regionaj Instancoj.
- Eblegi ĝemeliĝon kun Katalunio, kio estas favorata de nia regiona prezidanto, Marc Censi.

DUM LA DISKUTO,

J. Caubel rememorigas pri la projekto de federacio proponita de F. Knecht antaŭ deko da jaroj. Evidentiĝas ke la tiama statutpropono ne taŭgas en sia origina formo (tro komplika kaj detala) sed la celo estas la sama.

B. Legeay opinias pozitiva la projekton de ĝemeliĝo kun Katalunio.

Tuluzanoj prudentas:

Al sugesto, ke EKC fariĝu regiona federacio, la ĝenerala respondo estas ke ĝia celo estas alia (disponigi ejon por konkretaj realigoj kaj projektoj al tuluzanoj).

M. Issert pridubas la fareblecon de la projekto, ĉar en Tuluzo ni ne havas forton por tio. Li tamen opinias, ke ni ja bezonas informilon same bonan kiel tiu de Pol Denis en Bar-le-Duc. (Ĉu *Esperanto-Pyrénées* povus esti plibonigita? Kiel?)

Por G. Catala, la ĉefa problemo estas la mono.

Josée Lafosse (fervojistaj grupo) opinias ke ni plej bezonas instruantojn, ĉefe por infanoj, kaj ne organizaĵojn. Krome, ŝi atentigas ke la fervojista grupo jam apartenas al nacia kaj internacia fervojista federacio, kaj eble ne rajtas aparteni al alia federacio?

Jorgos precizigas sian proponon:

- La proponita federacio arigus ne nur esperanto-asociojn, sed ankaŭ asociojn kiuj subtenas esperanton (ekz-e MJCoj en kiuj oni instruas esperanton).
- Oni prezentu, nome de la federacio, subvencipetojn al la regionaj instancoj, por ĉiu el la dudek projektoj listigitaj.
- La teatro Krizalido subtenas la proponon de komuna subvencipeto.
- J. Decobert (el Pau) proponas kunlabori.
- Jorgos mem pretas esti sekretario de la federacio.

FINE ESTAS DECIDITE:

- Jorgos sendos al ĉiuj partoprenintoj kaj aliaj-celatoj projekton de statuto federacia.

- Surbaze de la ricevita kritikoj kaj reagoj, li verkos definitivan tekston en septembro.

- Tiam okazu RENKONTIĜO de la koncernuloj en Toulouse por decido kaj fondo de la federacio.

Tio, kio okazas ĉe niaj najbaroj, kompreneble interesas kaj koncernas nin.

Ni jam substrekis la pozitivan fakton, ke la diversaj E°-asocioj de Toulouse kunlaboros estontece. Ne estas ĉiam same en Francio! Esperanto sendube pli rapide progresus, se ĉiuj esperantistoj kunlaborus.

Nia federacio ja aliĝis al UFE, landa asocio de UEA. Tamen ni ne devigas la partoprenantojn de niaj aranĝoj aliĝi al UFE.

Ĉiuj esperantistoj, kiuj volas fari ion por la internacia lingvo kadre de nia federacio, estas bonvenaj. Ni volonte citas en SFS la aranĝojn kaj iniciatojn de asocioj aliaj ol UFE. Ni instigas niajn membrojn aŭ legantojn partopreni en diversaj aranĝoj. Ktp.

Alimaniere dirite, ni petas neniun "aktivi sub la ŝildo de UFE".


Estas vere, ke ekzistas (mi jam vidis kelkajn!) sendependaj homoj, kiuj estas ankaŭ sendecidaj kaj neaktivaj por esperanto. Lastjare mi aŭdis en kongreso de asocio (alia ol UFE), ke kunlaborado signifus formangadon... Laŭ mi, tio rilatas al maltolere-mo. Nia federacio intencas "formanĝi" neniun ne-UFE-anon! Esperanto bezonas ĉiujn fortojn. Bonfartu la kreata najbara federacio! Gi kalkulu, se dezirote je nia helpo kaj kunlaborado.

J. Hénin

Mi tre ĝojas ke mia frateto
alvenis iom pli frue.
NEVIK' naskiĝis hejme
la 3an de Junio 1993 je la 9a 20.
Ekde nun, Sylvie kaj Floreal
havas multon por fari...

KARLIN'
(esperanto)

Gratulojn al la gepatroj
Sylvie Baudin
Floreal Martonell
31450 Donneville



BEZIERS

Staĝo en Batipaume:

La deka jara staĝo en Agde bone disvolviĝis. Gi estis pli sukcesa ol la antaŭaj kun 39 staĝanoj. Verŝajne ni akiris sperton en la organizado, sed, certe la fakto, ke Sro Thierry, akademiano, gvidis la triagradan kurson allogis multajn. Pli ol la duono de la staĝanoj partoprenis tiun kurson. S-ino Bernard venis de Le Bouscat por vigle gvidi la 2agradan kurson. Si jam faris tion lastjare, kaj konsentas por la venonta staĝo. Ĉiam sindonema virino Ankaŭ la vesperoj estis agrablaj kaj interesaj: Sro Thierry prelegis pri Akademio. Dum la sekvanta vespero, ni ĝuis promenon tra Normandio kaj Guernesey dank'al la afableco de nia prezidanto S-ro Hénin. Kiel kutime por fini la staĝon, teatraĵetoj, zorge enscenigitaj de J-P. Peray, multe plaĉis al la ĉeestantoj, precipe "la pastro de Cucugnan" tre originale prezentita. Kantoj kaj poemoj aldoniĝis. Gratulojn al la staĝanoj, kiuj, kuraĝe, alfrontis la publikon.

Por ripozo, post la tagmanĝo antaŭ la kursoj, tiuj, kiuj deziris tion, eklernis akvarelon sub la sperta gvido de M. Rochard.

Ni ne forgesu, ke ĉiuj staĝanoj estis ege kontentaj pri la bonegaj kondiĉoj de akcepto en Batipaume: komfortaj dormoĉambroj, variaj manĝoj, afablaj deĵorantoj.

Apartan dankon al S-roj Llech-Walter kaj Gérard, kiuj salutis la staĝon kaj manĝis kun ni je la fino de la restado.

Sincerajn dankojn al ĉiuj, kiuj laboris kaj kunhelpis en la staĝo.

NDLR: Kiel merciite aliloke en tiu bultereno, la Nacia Kongreso okazos en Agde en 1994. Estos ebleco logi kaj manĝi en Batipaume. Nesolvita problemo estas la transporto ĝis la "Palais des Fêtes", kie okazos la kongreso (je 2 km!) Tre verŝajne la staĝo okazos antaŭ la kongreso (semajno de Cielirado). Gratulojn al la grupo de Béziers, kiu zorgeme organizis la lastan staĝon. En "La Marseillaise" aperis longa raporto pri la staĝo.

Caŭduro: Fine de Junio la grupanoj sin retrovis en "Mondhejmo". Anstataŭ la kutima pikniko, atendis ilin bonega paeljo, preparita de du grupanoj, kiun ĉiuj frandis.

En Septembro:

La forumo de la asocioj okazos sabaton, la 18an de Septembro sur la aleoj Paul Riquet. Dum la tuta tago, stando de nia klubo. Nepre vizitu ĝin!

Ni kunvenos en la klubejo, Maison des Associations, sabaton la 25an je 14h30 kaj organizos la agadon por la sekvontaj monatoj kaj precipe la kursojn.

Ni atendas konfirmon pri la vizito de Pakistanano (eble la 23an de Septembro).

Bonajn feriojn al ĉiuj!

LA CANOURGUE-RODEZ

En Majo, post la kongreso de Pau, Sro Tyblewski vizitis la grupon kaj priskribis la nunan situacion en sia lando. "Centre Presse" kaj "La Dépêche du Midi" raportis pri lia prelego (ĉi-sube en reduktita formato). Ankaŭ parolis S-ino Charpentier pri la Mondcivitanoj. Kadre de la prelegvojaĝoj de UFE, Pakistanano, Sro Ata Mohammad, vizitos nin fine de Septembro (li samtempe vizitos Ariège, Toulouse, Béziers, Nîmes).

ESPÉRANTO

Le message polonais


L'Espéranto se veut la langue internationale. Et doit permettre de favoriser la communication entre les peuples. C'est en tout cas la conviction du club de la MJC de Rodez (18 membres) qui invitait hier M. Tyblewski, psychosociologue de nationalité polonaise.

Le communisme, n'est plus désormais en Pologne qu'un mauvais souvenir. Ce qui ne signifie pas que l'on a gagné le paradis.

« Nous vivons avec l'espoir que ça aille mieux », indique M. Tyblewski. En sachant qu'il existe en Europe de l'Est d'autres cas beaucoup plus dramatiques aujourd'hui que celui de la Pologne.

D'Italie en France, de Toulouse à Clermont-Ferrand, M. Tyblewski témoigne de la situation d'un pays qui n'est plus sur le devant de la scène depuis que l'ex-URSS, Roumanie et ex-Yougoslavie, occupent les premières marches de l'actualité.

De l'Europe de l'Ouest, la Pologne attend d'abord qu'elle lui enseigne une façon de s'adapter à un nouveau style de vie. Voilà le message de M. Tyblewski. En Espéranto dans le texte.



M. Tyblewski et le responsable du club Espéranto de la MJC de Rodez : communiquer.

CONFERENCE ESPÉRANTO A LA MJC La Pologne dans le langage de l'espoir



Une trentaine de personnes se sont intéressées à l'histoire de la Pologne, version espéranto. (Photo: « La Dépêche ».)

Par définition, l'espéranto, langage de l'amitié aux ambitions universelles, ne devrait pas avoir besoin de traducteur. Malheureusement, ce n'est pas encore le cas à la MJC où le club ruthénois avait invité un psychologue de l'académie internationale des sciences, M Tyblewski, d'origine polonaise.

M. Legaty, président du club espéranto, s'est fait l'interprète de l'éminent professeur venu parler de la Pologne post-communiste dans ce langage d'espoir et de fraternité. L'assistance, plutôt réduite, laisse deviner que cette langue n'a pas, en Aveyron, un auditoire très représentatif.

Mais cette soirée était organisée aussi pour dire que l'espéranto est bien un moyen de communication qui fonctionne. Un réseau de clubs est même en place dans divers pays. À travers le monde, permettant aux adeptes de ce langage de se rencontrer et de faire du tourisme avec plus de commodité. Un côté pratique du même ceux qui pensent que l'espéranto est la langue de personnes ne pourront pas. Rappelons que le club de la MJC fonctionne tous les mardis, à 20 h 30. Deux groupes de niveau ont été formés pour l'apprentissage de la langue universelle. Selon le président de l'association, il faut compter deux cent cinquante heures pour acquérir les bases de ce langage et cinq cent heures pour une expression plus aisée.

LANGUE INTERNATIONALE

Les Espérantistes en stage

Le Cercle Biterrois d'Espéranto a organisé un stage de perfectionnement à Batipaume



SOUS l'impulsion de la Fédération Languedoc-Roussillon, le Cercle Biterrois d'Espéranto a organisé récemment un stage d'initiation et de perfectionnement en espéranto. C'est la 10^e fois que cette rencontre annuelle fut proposée à ceux qui désirent débiter ou progresser dans la langue internationale.

Le stage eut lieu à la mai-

son de vacances de Batipaume (Agde). Les participants, divisés en trois groupes, ont suivi des cours de divers niveaux. Le cours supérieur fut guidé par M. Jean Thierry (professeur de lettres et secrétaire de l'Académie internationale d'espéranto) dont la notoriété attira une bonne partie des stagiaires.

Outre les heures d'études

dispensées matin et après-midi, les soirées de détente restèrent culturelles, avec notamment la conférence ayant pour thème : "rôle et organisation de l'Académie d'espéranto".

Le prochain stage sera organisé en mai 1994 dans le même lieu. Il aura l'avantage de précéder le Congrès National de l'Union Française pour l'espéranto

(prévu pour les fêtes de l'Ascension). Nul doute que ces deux manifestations successives attireront de nombreux participants dans la région d'Agde.

Le Cercle Biterrois d'Espéranto se tient à la disposition de tous pour informations complémentaires sur les cours oraux ou par correspondance, siège : 9, rue Georges-Picot, Béziers, tél. 67.31.13.18.

La Nouvelle

MONTPELLIER

La 3an de Julio Kubano vizitis la grupon (prelegvojaĝo de UFE).

La Forumo de la Asocioj okazos la 12an de Septembro. Vizitu la budon de la grupo!
Ni atendas esperantistojn el diversaj landoj por la "semajnoj"

-en la Alpoj (Habère-Poche/74) de la 2la ĝis la 28a de Aŭgusto

-ĉe la marbordo (Sète/34) de la 4a ĝis la 11a de Septembro.

Bonan sukceson al la 18a kaj 19a semajnoj !

PERPIGNAN

2 eltiraĵoj de "L'indépendant Catalan".
En la unua estas anoncita prelego pri E^o
kadre de "AVF Accueil" (asocio de francaj
urboj).

Kiu scias iom pli pri la prelego kaj la
rezulto?

La dua konfirmas, ke Azianoj ankaŭ parolas
la internacian lingvon; la UK 94 okazos en
Seoul, Korea respubliko.

A.V.F. Accueil

Une conférence sur l'espéranto
sera présentée le mardi 15 juin
dans le cadre de l'association
A.V.F. Accueil. Ouvert à tous,
elle se tiendra au premier étage
de l'ancienne gendarmerie à
partir de 14 h 30.

Espéranto en Asie

Avec l'arrivée de l'ONU au
Cambodge, Phnom Penh est
devenue une tour de Babel: la
solution, l'espéranto, qui vient
de faire son entrée officielle
dans la capitale cambodgienne.
« L'Association Khmère d'Es-
péranto » a été mise en place la
semaine dernière avec l'assis-
tance de l'ambassade de Polo-
gne.

Selon son président, M. Chhim
Sokha, plus de 500 Cambod-
giens maîtrisent déjà l'espé-
ranto.



Kiel indikite sur la paĝo 2a, kelkaj informoj aperas tro malfrue. Tio estas la kazo kun la
biciklaj karavanoj (survoje al Valencia).

Internacia grupo gvidata de Dimitri kaj Aleksander (UKR) kaj Ivo (NL) biciklis el Ukrainio
tra nia regiono (la 15an kaj 16an de Julio). Ĉiutage ili biciklis/as inter 100 kaj 200 km.
Se via grupo akceptis ilin, bonvolu raportiti. Gazetartikoloj bonvenaj!

Pli trankvile biciklos 10/13-jaraj infanoj: Elina, Raphaël, Suzy, Guilhem, Edith, akompanataj de
Anglo Mike, Michel, Jorgos. Starto el Laroque d'Olmes (09) la 8an de Julio, direkto Gerona,
Barcelona (la 15an de Julio), Tarragona kaj alveno en Valencia la 24an. Elina partoprenos
la infanan kongreseton. Certe ili ĉiuj havos multajn spertojn raportindajn post tiu vojaĝo.
Gratulojn al Jorgos kaj la iniciatintoj. Agrablan bicikladon al ĉiuj!

ARIEGE

Anoncitaj aranĝoj en tiu departemento:

-EKOTOPIO: 5a internacia festivalo pri ekologio, ĉe la kastelo de Durban sur Arize.

En Aŭgusto, aranĝita de la asocio "Mille pattes" kaj de Eyfa (Eŭropa Junulara Porarbara
Agado). Bonvenotaj estas/os homoj, kiuj kontribuas al disvolviĝo de ekologiaj alternativoj.
Ekotopio atendas ilin por efika interŝanĝo de konoj, spertoj aŭ analizoj.

Kontaktoj: (31)46.513.045 kaj (33)61.048.469

-Lernejo "Talento" (Hungario) -vidu la antaŭan SFS.

"Le Journal de l'Ariège" tre detale raportis pri la celoj de tiu lernejo, uzante la pores-
perantajn argumentojn, kiujn ni aperigis lastfoje.

"La Dépêche" raportis pri la spektaklo de tiuj 12 hungaraj geknaboj en Moulis/St Giron.



Le 19 juin, à 21 heures, la
salle polyvalente de Moulis ac-
cueillera un spectacle des en-
fants de l'école de Talento
(Hongrie). Au programme: dé-
monstration de soroban théâ-
tré avec « Il était une fois un
roi », « L'Hippopotame amou-

reux d'une girafe » et « Divers-
jac stekcoj ». En intermède, le
public local pourra applaudir
le groupe vocal Dimanche soir.
À partir de 15 heures aura
lieu une exposition esperan-
to. — Photo « La Dépêche
du Midi ».



La antaŭa SFS menciis tiun gravan eventon "Prima de las léngas".

Jen detala raporto pri ĝi. Dankon al EKC.

Notu, ke estas vendebla vidbendo pri la televida debato.

"Prima de las Lengas - 1993"

◦ "Printempo de Lingvoj" (en la okcitana lingvo) estas granda festo pri lingvoj okazinta de la 20a de marto ĝis la 3a de aprilo ĉijare en Tuluzo kaj ĝia sukocidenta franca regiono.

Ĉijare tiu ĉi festo estis aparte grava, ĉar la okcitanistoj malfermis ĝin al la aliaj lingvoj.

De la komenco, Esperanto-Kultur-Centro (kunordigo de la tuluzaj esperanto-asocioj: UFE, SAT, Fervojistoj, EUROKKA) partoprenis la preparadon de la *Prima de las Lengas*, kie entute kunlaboris deko da asocioj, inter kiuj IEO (Instituto pri Okcitanaj Studoj), Calandretas (dulingvaj franca-okcitanaj lernejoj), Estèla d'Òc (Okcitanaj Studentoj), Casal Català (Kataluna Centro), Carrefour Culturel Arnaud-Bernard (Kultura Centro de la tuluzaj kvartalo Arnaud-Bernard), ktp.

Amaso da aranĝoj abundis en diversaj partoj de la urbo. Ni prezentos ĉi tie nur tiujn kiujn E·K·C instigis.

◦ La unua inaŭguro okazis la 20an de marto en la Unesko-Klubo, kie estis prezentita ekspozicio "*Musicas de las Lengas - Art et Caligraphies*" ("Lingvaj Muzikoj - Arto kaj Kaligrafio"), organizita de la Calandretas kaj E·K·C. Calandretas prezentis infanlibrojn en multaj diversaj lingvoj, dum E·K·C prezentis esperanton per ekspozicio kaj literaturo (libroj, revuoj), kaj desegnaĵoj de infanoj de la mondo de la grupo ICEM (Freinet-pedagogio). Ĉeestis ankaŭ Pitchke-pōī (jida asocio), Amazon-India (pri brazilaj indianoj), kaj Philémon (plurlingvaj bildstrioj).

Alia ekspozicio pri esperanto estis prezentita kun okcitana ekspozicio en la Universitato de Toulouse-Le Mirail de la 20a de marto ĝis la 2a de aprilo, kiel por tiu de la Unesko-Klubo.

◦ La 30an de marto, E·K·C kunordigis televidan debaton en la loka televidostacio TLT (*Télé-Toulouse*), kun Claude PIRON por esperanto, Jacme TAUPIAC por la okcitana kaj esperanto, Anne PÉCHOU por la angla, kaj Geneviève SAINT-HUBERT por la programo LINGUA. Tiu televida debato estis tro mallonga (nur 40minuta) por detale pritrakti la lingvajn problemojn; tamen ĝi ebligis prezenti ilin, kaj samtempe invitis al la morgaŭa debato en la universitato. La televida debato estis registrita sur vidbendon VHS/Secam; tiuj kiuj deziras ricevi ĝin, povos mendi ĝin de E·K·C kontraŭ 100 FRF + 20 FRF por sendokostoj. Sur tiu vidbendo estas ankaŭ raporto pri la ekspozicio en Unesko-Klubo.

En la universitato estis bona kunlaborado kun Estèla d'Òc. Kelkaj studentoj kiuj lernas esperanton plenigis enketilon al la gestudentoj de la universitato, kun relative interesa rezulto:

220 studentoj respondis. Inter ili:

95 neniam aŭdis pri esperanto antaŭ la enketo;

125 aŭdis pri esperanto sed ne sciis precize kio ĝi estas;

44 ekinteresiĝis pri esperantokursoj kaj donis sian adreson por eventuale lerni esperanton venontjare.

Tiu ĉi enketo estis farita inter la 20a kaj 30a de marto.

◦ La 31an de marto je la 14a horo, la debato komenciĝis ĉe la Forumo de la Universitato de Mirail.

Jomo (Jean-Marc LECLERCO), kantisto de la Rozmariaj Bejoj, prezidis. Ĉirkaŭ li estis Claude PIRON, Jacme TAUPIAC (kiu verkis okcitanan vortaron kun traduko en la kataluna kaj en esperanto), Jean THOMAS (de la Eŭropa Komisiono pri Minoritataj Lingvoj), Joan CLARET (de la Kataluna Centro), Martin HAASE (lingvisto pri minoritataj lingvoj), Christine VAILLANT (fakulino pri la angla), Geneviève SAINT-HUBERT (Programo LINGUA), kaj Xavier RAVIER (respondeculo pri latinidaj lingvoj en la Universitato).

La temoj de la debato estis "Kiun lingvopolitikon por la regionoj kaj por Francio meze de Eŭropo?", "Lingva komunikado strebante tutmondan dimension", kaj "Kiujn lingvojn ni parolos morgaŭ?"

La debato daŭris plimalpli tri horojn kaj duono. Ĝi estis tre interesa, kvankam ne estis veraj kontraŭuloj inter la sesdeko da ĉeestantoj. La debato estis surbendigita, kaj eblas mendi ankaŭ la du sonkasedojn kontraŭ 100 FRF + 20 FRF por sendokostoj. Ĝi estis registrita ankaŭ vidbende, sed la muntaĵo ne ankoraŭ pretas. Interesatoj povas sinanonci por eventuala mendo.

◦ La 3an de aprilo estis la granda Fina Festo en la Tuluzaj Sportejoj. Dum la antaŭa tago ĉiuj ekspozicioj estis translokitaj tien.

Sabate matene je la 11a estis surstrataj spektakloj ĉirkaŭ la Ĉefplaco de Tuluzo (Capitole) kaj ĝiaj stratoj, kun trupo de muzikistoj kaj katalunaj "diabloj" (fajrojetistoj).

Samtempe okazis la malfermo de la Ekspozicio pri Lingvoj en la Sportejoj. Tie estis amaso da ekspozicioj kaj budoj prezentante lingvojn okcitanan, esperanton, amazonindian, indonezian, armenan, berberan, eŭskan, katalunan, korsikan, nordfrancajn ŝtimian kaj francikan, ktp. De la 16a horo la diversaj asocioj sursceneje prezentis jen teksteton, jen poemeton en sia lingvo. Ĉirkaŭ la 17.30 surscenejiĝis centoj da infanoj de la Calandretas por prezenti ĉarman fiorskantadon.

